

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 501

JULIO 1947

ENCIKLOPEDIA VORTARO ESPERANTA—GERMANA

E. WÜSTER

Jen verko senparela en nia literaturo. Ne nur vortaro sed ankaŭ serio de monografoj pri ĉiaj demandoj rilate al Esperanta gramatiko, vortaro, uzado. Wüster, kun aro de helpantoj, zorge kribis la Esperantan literaturon, kaj kun aparta detaleco la verkojn de Zamenhof; komparante, pezante, klasigante, laŭ pleneco kaj perfekteco preskaŭ nekredeblaj. ENCIKLOPEDIA VORTARO estas la frukto de tiu kolosa laborado, multthoma kaj multjara; majstraĵo de klereco, konsultoverko netakseble valora por la serioza studanto, la konsciencia instruisto, la vortaristo. La enkonduko estas unika studo pri Esperantologiaj principoj, la transskribo kaj formado de teknikaj terminoj, kaj similaj demandoj.

Ĝis nun aperis kvar volumoj, A-KOR, kaj tiuj estas nun denove haveblaj. La manuskripto de la cetera parto ankoraŭ ekzistas, kaj espereble eldoniĝos post du-tri jaroj. La ekzistantaj volumoj estas mino de trezoro—trezoro iom kaŝita por tiu, kiu ne scias la Germanan lingvon, tamen eĉ por li elfosebla pere de vortaro, kaj ĝenerale sufiĉe komprenebla pro la multegaj ekzemploj Esperantlingvaj kaj mallongigoj tre plenaj kaj klarigitaj.

Ĉiu volumo kostas 15 ŝilingojn anglajn, afranko 6p.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponono por ĉiu du da vortoj.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Brita oficejo deziras korespondi kun geislamanoj. J. Cameron, Lloyds Bank, Wolverhampton, Anglujo.

Instituto de Administrado Trafika : Vic-prezidanto deziras korespondi kun interesatoj pri transportaj temoj. Bonvole skribu al BM/DNJN, London, W.C.1, Anglujo.

Atentu! Deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kaj leteroj kun ĉiuj landoj; uzos ĉion por granda ekspozicio, Vizistino Rut Eneland, Carm, Markaryd, Svedujo.

Jus fondita nova klubo serĉas kontakton kun la tuta mondo por korespondado, interŝanĝado, k.t.p. Junaj gekursanoj atendadas eĥon. En Julio ni havos unuan ĝeneralan konstitucion kunvenon. Sendu salutojn multnombre kaj diversajn aĵojn por estonta ekspozicio. Responde garantiata. Esperantista Klubo, Josefov, Karel Holeček, Ĉeĥoslovakujo.

Kontraŭ 50-100 vialandaj pm. mi sendos egalkvanton. Rüdiger Eichholz, (20b) Grone bei Göttingen, Greitweg 42, Germanujo.

Sep Germanaj gesamideanoj serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj. Nepra respondo. Alfred Meister, München/Ofr., Schubertstr. 3, U.S. Zone, Germanujo.

Interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn Mrazek Otto, Purkersdorferstr. 13, St. Pölten-Ob.-Wagram, Aŭstrujo.

Gesamideanoj! Por reklamo la firmo Martini Alberto, via Aleardi 38, Firenze, Italujo, sendos per rekomendita poŝto: 20 ilustritajn poŝtkartojn de Florencaj vidajoj kontraŭ 5 respondkuponoj; 50 rememorigajn poŝtmarkojn kontraŭ 10 respondkuponoj (aŭ 50 komunajn por 2 respondkuponoj); mozaikan ornamajn kontraŭ 10 respondkuponoj (indiku ĉu pinglon, malgrandan krucon, aŭ braceletojn; por aliaj modeloj petu la prezon). Sendu tuj mendon. Afranku filatele!

Filatelistoj! Ĉiujn novelondanojn de Italujo, Vatikana Urbo, havigos malaltpreze aŭ ŝanĝe kontraŭ neuzitaj poŝtmarkserioj: Roberto Lenzi, Faggiola 5, Pisa, Italujo. Petu informojn.

Doktoro Rizzoli, Cavelletto 35, Reggio Emilia, Italujo; ricevinde Eŭropajn memorigajn poŝtmarkojn mi interŝanĝas memorigajn poŝtmarkojn de Italujo. Korespondas france, germane.

Junulo deziras korespondi kun ĉiuj landoj; interŝanĝos librojn, pm. Certa respondo. Donald Bushaw, 1802 C Street, Pullman, Wash., Usono.

Paul Günzel, lernejestro, Gertrud Günzel, instruistino, 25-jara, Elisabeth Günzel, instruistino, 24-jara, (23) Bremen, Rennstieg 49, Germanujo, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo.

Germana advokato, 36-jara, edzo, nun en Franca militkaptitejo, serĉas respondecan postenon post sia liberigo en eksterlando, en industrio, internacia instituto, aŭ organizaĵo. Scias anglan kaj francan lingvojn, deziras eblecon por kunlaboro en la Esperanta movado (UEA-ano antaŭ 1933); skribu al Hermann Wappler, (21b) Neheim-Hüsten 2, Norbertusstr. 26, Germanujo.

Esperanto-Societo Köln-Mülheim (Kolonjo) okazigos la 4an de Oktobro 1947 letervesperon. Ni petas multnombrian alsendon de poŝtkartoj ilustritaj, leteroj, gazetoj, k.t.p. Ni certe respondos. Skribu al la prezidanto Franz Kreutzberg, (22c) Köln-Mülheim, Knipprodestr. 19, Brita Zono, Germanujo.

Madejano deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj Nepre respondos. S-ro João Julião Cardoso, Caminho de S. João 19, Funchal, Madejra Insulo.

Grupo en Nice deziras rilati kun eksterlandaj grupoj havantaj almenaŭ 200 geanojn. Interesa propono, plej efika nova propaganda rimedo. Skribu: Esperanto-Grupo, 5 Boulevard Stalingrad, Nice (A.M.), Francujo.

Esperantistoj en la tuta mondo! Ö. G. Distrikto de S.E.F. ricevis lokon por montri ekspoziciaĵojn pri la Esperanta movado, la 18/6-10/8 1947. Montru ke ekzistas Esperantistoj en la mondo. Skribu salutleterojn rekte al: La estraro de "Jubileumsutställningen i Örebro 1947, Idrottshuset, Örebro, Svedujo.

Korespondon kun Germanaj korespondemuloj peras la Korespanda Servo de la Germana Esperanto-Asocio, Ffm.-Höchst, Leverkusenstr. 16, U.S. Zone, Germanujo.

Grietje Loeckx interŝanĝas poŝtmarkojn, Konijneparken 107, Boschvoorde, Belgujo.

Deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj F-ino J. Gardner, P.O.B. 167, Nicosia, Cipro.

Deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn; certe respondos: Willi Nitsch, Rheingoldstr. 33, (22a) Rheinhausen, Germanujo.

Psikologo kaj grafologo serĉas ideinterŝanĝadon kun samintereseanoj en ĉiuj landoj pri psikologio, karakterologio, kaj grafologio. Skribu al D-ro Horst Bitterling, (20b) Göttingen, Schillerstr. 66, Germanujo.

Armin Schorecht, (20a) Hannover-Herrenhausen, Klau-staler Weg 10, Germanujo, deziras korespondi; certe respondos. Bonvolu afranki filatele.

Poŝtmarkojn kvanton kontraŭ kvanto interŝanĝas; ĉiam respondos: Myron Mychajliw, (13a) Bayreuth, Leonrodstr. 2, 1, U.S. Zone, Germanujo.

Okaze de la T.J.O. Internacia Tendaro, Ipswich, Anglujo, en Aŭgusto, ni deziras aranĝi grandskalan ekspozicion de ĉiusepacaj Esperantaĵoj. Sendu ĝisdatajn gazetojn, aŭ presitajn aŭ multobligitajn, glumarkojn, Esp. novaĵojn, k.t.p. Ni ankaŭ bezonas salut-leterojn el ĉiuj landoj. Atentu, ke via lando estu reprezentata. Sendu tuj kaj grandamase al S-ro Jack Heath, 74 Dales View Road, Ipswich, Anglujo: sendaĵoj devus alveni antaŭ la 9a Aŭgusto. Dankojn al ĉiuj helpontoj!

LINTEKSAĴOJN

toĵojn blankajn, kolorajn, kaj presitajn,
glastukojn, kaj damaskajn tablo- kaj
man-tukojn

ĉiulanden eksportas lintekeŝe

EDUARD MORAWETZ, a.s.

UPICE, ĈEĤOSLOVAKUJO

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

40a JARO N-ro 501 (7)
JULIO 1947

Fondinto :

H. HODLER

Redaktoro :

HANS JAKOB

ESPERANTO, PALAIS WILSON
GENÈVE, SVISLANDO

OFICIALA ORGANO
DE UNIVERSALA

ESPERANTO-ASOCIO

(IEL kaj UEA kunigitaj)

Eldonejo

(al kiu oni sendu ĉion pri
reklamoj kaj administrado)

HERONS GATE, RICKMANSWORTH
HERTS., ANGLUJO

Jara abono : 7 ŝil. 6 pencoj
(kun membreco kaj jarlibro
10 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅓ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkuponon por ĉiu
duo da vortoj

Eldonnumero :

7,000

Legantoj en 65 landoj

1887—1947

Datreveno donas okazon ekhalti kaj ekzameni atingitaĵojn. Tia datreveno estas por ni Esperantistoj, la 14-a de Julio, tago je kiu aperis en jaro 1887 modesta broŝuro, mizere presita sur griza papero, sed libreto kun ora enhavo. Temas pri la "UNUA LIBRO de la lingvo internacia" de Doktoro Esperanto, la semo de nia ideo. Kun pia sento oni rigardas tiun ĉi libreton kaj ĝojsente vidas la arbon kiu kreskis el tiu ĉi semo, la Esperanto-Movadon kun ĉiuj ĝiaj branĉoj, la literaturon, la manifestaciojn publikajn kaj ne forgesinde : la uzantaron, kiun iuj nomas ne sen rajto la esperantistan popolon. Konstatante tion, oni komprenas la antikvan diradon : *Habent sua fata libelli*, t.e. libroj havas sian sorton !

Ĉu estas ironio de la sorto tiu ĉi 14a de Julio, tago de la kuratako de la *Bastille*, komenciĝo de la Franca revolucio ?

En tiu ĉi *Unua Libro* troviĝas folieto kun deklaro por subskribi laŭ jena teksto :

"Promeso : Mi subskribita promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson. Subskribo : "

Admirinda tiu ĉi kredo je la propra ideo kaj je la preteco de la homoj ĝin akcepti kaj agi. En la komenco estis la parolo kaj la ago. D-ro Esperanto ne nur parolis sed agis. Tridek jarojn post apero de la *Unua Libro*, en 1917 forpasis tiu ĉi viro de malofta ekzemplo, kaj dulinia informo telegrafa anoncis tion el okupita Varsovio al cetera mondo.

Homo ekstreme modesta, la kreinto de Esperanto donis al siaj disĉiploj la elementojn de la lingvo, ne tute preta, ne perfekta, ni diru homa. Li konis kaj aplikis la oran regulon, ke en la *mezuro montriĝas majstro*, aŭ per aliaj vortoj, ke per la sinlimigo evidentiĝas la vera genio.

Konvenas hodiaŭ dankeme memori la genton al kiu apartenis la Majstro. Pelita, persekutita, premita jam de ĝia apero en la mond-historio, tiu ĉi popolo donis al la homaro multon. Multajn ideojn kaj multajn profetojn de grandaj ekkonoj. Tiu ĉi multaj de genioj devenas de nekontestebla kapableco de tiu ĉi gento analizi, t.e. iri ĝis la kerno de afero. Longa estas la vico de la analizantoj de la homaj estaĵoj kaj faro kiun donis la juda popolo, nomoj gravuritaj en la libro de la homaro. Mozeo, Kristo, Spinoza kaj multaj aliaj. Ne laste venas Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu kompletigis la instruojn de la grandaj homamantoj per instrumento de rapida interkompreno lingva. La sorton de la juda popolo, esti miskonata kaj persekutata trafis ankaŭ nian ideon kaj movadon. Sed simile je Fenikso, releviĝinta el cindro kaj fajro, ankaŭ nia afero releviĝos, marŝante je la celo fiksita. La ekzemplo de firma kredo kiun donis nia Majstro gvidu nin !

H.J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Argentino

Dum Pasko pasinta okazis en Buenos Aires la IV-a Argentina Kongreso de Esperanto. Krom la delegitoj kaj ceteraj kongresanoj de la enlando, venis ankaŭ reprezentantoj el Urugvajo kaj Brazilo; tri el la lastenomitaj ricevis oficialan subvencio de la registaro.

La ĵurnalaro ĉiutage informis dum la Kongreso kaj kelkaj gazetoj publikigis gravajn artikolojn pri la okazantaĵo. Unu grava vesperĵurnalo komencis kurson de Esperanto verkita de S-ro T. Sekelj.

La prezidanto de la Kongreso estis S-ro Eugenio Iglesias. Saluti en la nomo de Urugvajo Prof. Manuel Fernández Menéndez, D-ro Mario Ritter Nunes saluti en la nomo de la *Instituto Brasileiro de Geografica e Statistica* kaj montris belegan grandformatan broŝuron pri la rilato de ties fako kun Esperanto, kiun la Instituto eldonis, kune kun arta fotografajo de D-ro Zamenhof, kiujn oni dediĉis al la IV-a Argentina Kongreso de Esperanto.

S-ro Ismael Gomes Braga parolis en la nomo de Brazilo Ligo Esperantista kaj de Brazilo Spiritista Federacio.

F-ino Maria da Luz Costa reprezentis la Brazilan Esperanto-Klubon, kaj D-ro Rómulo Zeballos Morales, salutante en la nomo de Urugvajo, anoncis baldaŭan eldonon de tradukita verko de fama Urugvaja verkisto, José Enrique Rodó.

Inter multaj gravaj aferoj, kiujn oni diskutis, estis propono okazigi tutamerikan kongreson de Esperanto.

En la vespero de la 5-a de Aprilo okazis societa kunveno kun tre interesa programo, kaj la sekvantaj vesperon oni aranĝis *vivan gazeton* en kiu raportis multaj konataj samideanoj.

E.I.

Singaporo

Per *Letero el Singaporo* ni ekscias, ke Hou Chio Lernejo fariĝas rendevuo por vizitantoj samideanoj. La grupo tie jam bonvenigis plurajn alilandajn Esperantistojn, kaj tio bone efikas laŭ propaganda vidpunkto.

Vigla agado en Aŭstrujo

La Esperanto-Servo de Vieno sciigas pri la rezultoj de dujara laboro de la movado en Aŭstrujo. La listo estas longa kaj spegulas la entuziasmon kaj praktikan vidpunkton de la tieaj laborantoj. Oni precipe atentigas pri la radio-dissendoj el Vieno kaj petas la apogon de aŭskultantoj, kiuj bonvolu skribi al la stacio Ravag Wien-Aŭstrujo, IV, Argentinierstrasse 30a.

Britujo

La 42a Skota Kongreso okazis la 9an-11an de Majo en Stirling, malnova kaj historia urbo. Ĉeestis 74 samideanoj.

Prezidis S-ro D. Kennedy, Glasgovo, kaj la kongreson salutis tre multaj naciaj kaj internaciaj organizantoj.

La kongreso sendis al UNESKO rezolucion pri la enkonduko de Esperanto kiel neŭtrala help-lingvo.

Kiel prezidanton por 1947-8 oni elektis F-inon P. C. Sinclair, Buckhaven, Fife.

En publika kunveno la urbestro bonvenigis la kongresanojn, kaj eminenta Skota advokato kaj publicisto, samideano E. Rosslyn Mitchell faris elokventan paroladon pri Esperanto.

Dimanĉon oni ĉeestis Diservon en bela renovigita preĝejo *Holy Rude*, kie predikis Pastro W. H. Drummond-Page, filo de eminenta Skota Esperantisto. Monkolektaĵon oni donacis al la Blindula Kaso.

Oni finis la kongreson per ĝojiga aŭtobusa ekskurso tra Perthshire, unu el la plej ĉarmaj graflandoj de Skotlando.

Polujo

Dum la lasta tempo nia movado ekfloras en Krakovo, plejparte sekve de la klopodoj de Prof. M. Sygnarski, lektoro en la Universitato. En la fino de la pasinta jaro, la Kuratoro de tiu distrikto sciigis estrojn de mezlernejoj pri aranĝotaj Esperanto-kursoj. Malgraŭ ke anoncis sin pli ol 300 gelnantoj en 12 lernejoj, la kuratoro opiniis la nombron nesufiĉa kaj oni ne daŭrigis la aferon. Prof. Sygnarski tamen mem entreprenis la instruadon de kursoj kaj sukcesis fari rikolton el tiu multpromesa materialo. Kursfina soleno okazis 20-an de Majo 1947, kiun ĉeestis pluraj eminentuloj de la Universitato, reprezentantoj de la gazetoj k.s.

La gekursanoj bone kaj konvinke demonstris la facilecon de la lingvo per multaj fluparolaj dankesprimoj al la gvidinto, al kiu, cetere oni faris belan donacon.

M.S.

Francaj Fervojoj

La Franca Nacia Fervoja Societo respondas en Esperanto al ĉiuj demandoj pri sia fako. Favoraj prezoj pri kolektiva kunvojaĝado. Oni sin turnu al Bureau des Renseignements, Gare St. Lazare, PARIS.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



***Eta Krestomatio :** de P. Neergaard kaj P. Thorsen. Eld. Esp.-Forlaget "Sefo", Danujo. 24.4 × 17.2 cm. 48 p. broŝ. kun ilustraĵoj. Prezo

2 ŝil., franko 2p.

Ĉi tiu modesta volumo estas rimarkinda, unue pro la eleganta kaj bonstila lingvo, kaj due pro tio, ke oni redonas al ni pecojn de prozo el la pasintatempa Esperanto-literaturo, kiujn oni devus ne forgesi. Kiel ĝojige estas, ekzemple, denove legi *La Fosiloj* de T. Cart, *Esperanto Kiel Traduka Lingvo* de E. Boirac, *La Instruanto al la lernanto* de E. Lanti kaj multajn similajn. Kiel refreŝiga kristala akvo por soifanto en varmega tago, ili donas kontentigon al niaj sopiroj pri lingvo-belo, kiuj tiel ofte en la nuna tempo vane serĉas plenumon.

Kvankam oni indikas la fonton de la diversaj elĉerpajoj, mi tamen trovis neniun aludon pri kopirajt-permeso.

La modernaj kontribuoj ĝenerale estas altnivelaj, sed pluraj formoj, pri kiuj oni povus profite interdiskuti, enŝteliĝis.

Mi varme rekomendas la lastan eron en la volumo, en kiu P. Neergaard pritraktas la diverĝan fenomenon ĉe Esperanto-uzado. Mi permesas al mi sugesti, ke la plej grava danĝero en la nuntempa stadio de Esperanto estas la kreskanta tendenco doni ĉiam pli novajn signifojn al sama radikoj. Tiu plureco de signifo karakterizis la frutempan vortprovizon (inkluzive de la Zamenhofa) sed ni ne devas sekvi la vojon de la naciaj lingvoj. Tio ne estas evoluo, sed tio, kion Zamenhof nomis . . . *la pereiga disfalo de la lingvo en diversajn dialektojn*.

Preso kaj papero bonegaj. Tre rekomendinda.

M.S.

***Kvara Rapsodio :** redaktis F. Szilagyi : eld. Eldona Soc. Esp., Stockholm. 21.3 × 14.7 cm. 48 p. broŝ. Prezo : 3 ŝil., afr. 2p.

Ĉi tiu kolekto de 24 pecoj el prozo kaj poezio daŭrigas la konatan serion. La nomoj de la kontribuintoj—Engholm, Waringhien, Kalocsay, Gerdman, Baghy, Stöp-Bowitz, Szilagyi mem, por nomi nur kelkajn—garantias la altan nivelon de la enhavo, kiu cetere estas respektive distra, instrua, ŝoka kaj amuza. Ne ĉio plaĉos al ĉiu leganto, sed ĉiu leganto trovos ion plaĉa.

Interese estas kompari la Esperanto-uzon ĉe la diverslandaj verkistoj kaj oni povas esti kontenta, ke malgraŭ la diverseco de nacieco, la verkaro elmontras rimarkindan unuecon. Eĉ ĉe la poezio, kie ĝenerale regas plej granda diverseco, ni povas

konstati strebadon al atingo de normo. Nur L. Tarkony (Totsche) alportas eĥon el la intermilita eksperimentemo per sia alie bonega *Nordo*. Ĉiuj kiuj interesigas pri la Esperanto-poezio aprobas la provon de B. Gerdman apliki la principojn, kiujn ellaboris Brendon Clark en artikolo en *Esperanto Internacia*. La beleco, la fluo kaj la klara komprenebleco de tiu senelizia poemeto pravigas la teoriojn de Clark kaj pravas, ke liaj principoj estas aplikeblaj kun sukceso ekster la Angla lingvo. Laŭ mi la plej rimarkinda afero ĉe tiuj principoj estas, ke ĉi tiu kompare novbakita Esperantisto sukcesis tie, kie tiom da tiel nomitaj spertuloj malsukcesis. Uzi elizion sekve de la malfacileco de ritmofarado en Esperanto, sed ne fronti al la problemoj kaj solvi ĝin sen enkonduko de mallongaj neologismoj, estis laŭ mi unu el la plej hontindaj malvenkoj ĉe la Esperanto-literaturo.

La lingvo estas nekutime bona kaj la verkaro estas rekomendinda. La papero kaj preso bonaj.

M.S.

***La Vana Kanto :** de Lucien Thèvenin. Versoj dediĉitaj al la internacia amikeco. Eldono de *Kompreni*, 32 Cours Gambetta, Lyon VII : 12 × 15.5 cm., 64 p. Prezo : 2 ŝil., afr. 2p.

Regula leganto de la ĉefaj periodaĵoj esperantistaj renkontis certe la nomon de la verkinto, Lucien Thèvenin, lerta versisto. Tiu ĉi libreto, bone presita, bone legebla, enhavas proksimume sepdek da poeziaĵoj laŭ ĉiuj versformoj kaj pri ĉio kio movigas menson kaj koron. Plej plaĉis al ni tiu ĉi simpla verso kun titolo *Pacigo*

Mi ŝatas la murmuron de l'vespera vento
blovanta tra l'silento.

Ho, kiom estas plaĉa ties dolĉa bruo
al mia kor-enuo ! . . .

Kaj luno kiu glitas alte sur ĉielo,
simile al juvelo,
dismetis lumon de vizaĝo pale ora
sur mia vundo kora.

H.J.

De Ramón Lull a los modernos ensayos de formación de una lengua universal : de Joaquín Carreras Artau. 16 × 11.6 cm. Prezo 12 pesetoj. Barcelona.

Hispanujo, kiu ĝis nun apenaŭ kontribuis al la historio de la internaciaj lingvoj, ĵus donis al ni la supre cititan libreton. Ĝia titolo en Esperanto povus esti : *De Ramón Lull ĝis la modernaj provoj formi unu mondlingvon*.

J. Carrera Artau, profesoro de filozofio, specialiĝis pri la studado de la mezepoka Kataluna filozofio, Ramón Lull (1235–1315). Li montras kiel Lull influis sur Leibniz. Lull neniam parolis

Fino sur paĝo 105

ESPERANTO KAJ RADIO

Sendu informon al S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo.

Ĉiutage	15.30-15.45	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 1935m. kaj 31.41m.
	21.00-21.15	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 49.92m.
Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. Poresperanta parolado.
	20.50-21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.30-22.35	Budapest I (Hungarujo). 549.5m. Informoj. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u.7.
Mardo	18.50-19.00	Sofia (Bulgarujo). 32.9m. Prelegoj. Radio Sofia.
	20.50-21.00	Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 249.2m. Informoj. Radiostacio, Ostrava Bráfova 5.
Merkredo	5.35-5.45	Wien I (Aŭstrujo). 506.8m. Esperanto-kurso. RAVAG-Wien, 30a Argentinierstr., Wien IV.
	5.55-6.10	Sottens (Svislando). 443.1m. Kurso. Société Suisse de Radiodiffusion, Studio de Genève, Genève.
	10.15-10.35	Paris (Francujo). 431.7m. Esperanto-kurso.
	21.10-21.25	Warszawa III (Polujo). 49.06m. Informoj. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
Ĵaŭdo	16.50-16.55	Wien II (Aŭstrujo). 31m., 41m. kaj 228.6m. Informservo. RAVAG-Wien.
	17.45	Bern (Svisujo). 47.28m. (ankaŭ 200m. proks. laŭ raporto). Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat. Societo Svisa de Radio-dissendo, Bern.
	18.45-19.00	Hradec Králove (Ĉeĥoslovakujo). 280m. Esperanto-programo. Vychodočeky vysílá, Hradec Králové.
	20.50-21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	18.50-19.00	Sofia (Bulgarujo). 32.9m. Prelegoj. Radio Sofia.
	20.50-21.00	Ostrava. 325.4m. (kiel je mardo).
	21.35-21.50	Sottens. Ripeto de la merkreda programo.
Sabato	15.10-15.25	Hilversum (Nederlando). 301m. Parolado. Nur je la 5a Julio kaj 2a Aŭgusto.
	19.00-19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	20.00-20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la hor sistemo de Greenwich, sed demandas signon post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la hor sistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni urĝe petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuletojn kaj informojn pri ricevado.

ESPERANTO INTER UKRAJNANOJ

En la zonoj de Germanujo okupitaj de Britoj kaj Usonanoj, vivas nuntempe ĉirkaŭ 250 miloj da Ukrainanoj, elmigrintoj el Sovet-Unio kaj Polujo, kiuj pro la politika situacio kiu regas en ilia patrujo ne povas reiri en sian hejmon, sed devas trovi novan patrujon kie oni povos aranĝi liberan vivon.

Transmigrante kelkajn landojn kaj kontaktinte la lingvan diversecon, ĉi tiuj elmigrintoj spertis plej dolore la malbenon de la babelo. Tial iniciata grupo de la Ukrainaj Esperantistoj en Germanujo decidis propagandi Esperanton inter siaj samnacionoj. La laboro donis neatenditan sukceson. Aliĝis multaj malnovaj samideanoj kaj fondiĝis novaj grupoj kiuj intencas sin organizi en federacio. Oni organizas kursojn, propagandas Esperanton en nacilingvaj gazetoj, kaj eĉ eldonas propran gazeton 12-paĝan, la ĉiunonatan *Ukraina Esperantisto*. Pro manko de papero ĝi aperas nur je 500 ekzempleroj.

Ukrainaj Esperantistoj en Germanujo sin turnu al S-ro M. Mychajliw, (13a) BAYREUTH, Leonrodstr. 2.1., US Zono, Germanujo.

KION NI POVAS KONKLUDI EL LINGVAJ STATISTIKOJ?

Vi certe aŭdis pri la baza angla lingvo, kiu estas konstruita evidente *por la malsuperaj nacioj kaj rasoj*, al kiuj la lernado de la vera angla lingvo estas tro malfacila. Ĝi konsistas laŭ reklamo el 850 vortoj, kiuj sufiĉas por kompreni ĉion verkitan en tiu lingvo, kaj esprimas samon kiel 20.000. El la 200-paĝa gramatiko de la idiomo (la libro vere enhavas nur gramatikon kaj la vortliston) ni tamen konstatas, ke inter tiuj 850 mankas la numeraloj, la nomoj de la monatoj ktp. Fakte la gramatiko donas entute liston de 1076 vortoj. Estas iom malfacile konjekti pri la esprimkapablo de tia lingvo, sed ĉiukaze oni povas konstati, ke ĝia konstruo fundamente diferencigas de tiu de la angla lingvo, kaj sekve la lernado de *baza* lingvo ne ebligas kompreni aliajn tekstojn ol speciale verkitajn *bazajn*.

Aliparte, eminenta lingvoinstruisto kaj verkinto de lernolibro *Angla lingvo per la natura metodo*, Arthur M. Jensen kalkulis, ke speciale elektita vortprovizo de 2300 anglaj vortoj sufiĉas por kompreni 94% de *ordinara* teksto. Kaj tiun vortprovizon li instruas en sia kurso. 94% sonas tre impone, sed ni ne forgesu, ke ĝi signifas tion, ke 6% el la vortoj en la legata teksto estas divenotaj aŭ serĉotaj el vortaro. Tio signifas, ke se ni legas romanon 300 paĝan kun ĉ. 350 vortoj sur ĉiu paĝo, el la cent mil (100.000) vortoj de la romano ni ne komprenas 6000. Ne estas malgranda laboro elserĉi tiujn el vortaro!

Ni ja bone *scias*, ke en Esperanto sufiĉas al ni pli malmulto. El ĉiu radiko ni povas senĝene formi *senfine* multajn derivaĵojn. Sed kiel multe tio fakte helpas al ni dum legado de esperanta literaturo? Tion verŝajne neniu *scias* precize.

Ĉi tiuj konstatoj instigis min statistiki iom nian lingvon. Unue mi faris du listojn, kiuj ambaŭ enhavis la vortojn necesajn por esprimi la samajn ideojn, kiujn oni povas esprimi per 850 anglaj vortoj, unu laŭ *baza*, alian laŭ la unue instruataj vortoj de la metodo de A. M. Jensen. Poste mi kalkulis la ordinarnajn derivaĵojn, kiujn citas la bonega vortaro de E. A. Millidge, kaj povis konstati, ke Esperanto bezonas por tegi la nomitajn vortlistojn proksimume 500 radikvortojn, sed konstruas sur ilia bazo ĉ. 6000 ordinarnajn vortojn.

Nun mi transiris al la Ekzercaro de la Fundamento de Esperanto. Pri ĝi ekzistas bonega *konkordanco* de Wackrill. Laŭ ĝi oni povas fari al si klaran bildon pri la tute teksto. En ĝi estas entute preskaŭ 5800 vortoj, inter kiuj preskaŭ precize 850 malsamaj. Estas interese konstati, ke la listo de la plej oftaj komenciĝas

per *La, mi, estas, kaj . . .*, kaj ke la 25 plej oftaj vortoj, el kiuj la malplej oftaj aperas 37 foje (0.6%), kovras 45% de la tuta teksto. Se ni nun faras elekton de 350 elementoj (kvardeko da afiksoj kaj la resto veraj radikvortoj) inter la plej oftaj (ofteco minimuma 0.05%), ĉi tiuj vortoj kovras 86.4% de la tuta teksto. La resto, 500 vortoj, estas do uzata nur por 13.6% de la tuta teksto.

Ĉi tio pravas per evidenteco, ke estas granda diferenco en la ofteco de la vortoj en ĉiu teksto. Oni tamen demandas, ĉu estos granda diferenco, se oni mezuros la taŭgecon de tiel farita vortelektio al iu tute fremda teksto. Por ricevi respondon al tio, mi prenis hazardajn provojn de kelkcent vortoj el ordinara romano, antaŭ nelonge publikigita, kaj same alian provtekston el la facila legolibro de Doktoro Privat, *Karlo*. Montrigis, ke persono, kiu konus nur la 350 plej oftajn vortojn de la *Fundamento* komprenus el *Karlo* 81% kaj el ordinara romano 77%.

Mi ne havis je mia dispono statistikojn aliajn pri la ofteco de esperantaj vortoj. Sed oni povas, gvidata de sia memoro kaj *sen*to, facile klasigi la vortojn al pli oftaj kaj malpli oftaj. Tio povas okazi per pli-malpli bona sukceso. Sed tiun sukceson oni povas kontroli per simila hazarda provo, kiel la jam preparolitaj. Sekve, mi kunmetis laŭ propra prudento gradigitan serion da vortprovizoj kaj provis ilin per la samaj tekstoj el *Karlo* kaj la aludita romano. Uzante saman tekston por ĉiu vortprovizo ni ricevas ciferojn inter si kompareblajn. La rezulton mi donas en formo de tabeleto:

	Amplekso de la vortelektio	Partumo de teksto senplue komprenebla	
		el Karlo	el ordinara romano
350 vortoj	..	81%	77%
550 "	..	89	84
950 "	..	94.3	91.7
1800 "	..	99.1	98.1
3400 "	..	100.0	99.8-100.0

Per facila metodo, kiun la matematikistoj konas kiel grafikan interpolon, oni povas per granda probableco ricevi la rezulton, ke vorttrezoro de ĉ. 1100 vortoj sufiĉas por simila rezulto (94%), kian oni pretendas al la 2300 vorta provizo angla. La diferenco inter ĉi tiuj du vorttrezoroj estas tamen multe pli granda, ol kion oni kredus pro la ciferoj 2300 kaj 1100. Nome, ĉi tiuj nombroj por la Esperanta teksto estas ricevataj el proksimume 1000 vorta prov-

ONI ALVOKAS!

Rubriko komencita per helpokrio de la redaktoro!

Ĝojiga signo de la revigligo de nia movado estas la ĉiutage ricevataj poeziaĵoj kaj alvokoj. Por presigi ĉiujn en konvena tempo, nia revuo devus aperi semajne!

Por ke alvoko de ĝenerala intereso povu aperi rapide necesas ke ĝi estu konciza. Ŝparu la adjektivojn, uzu kie vi povas verbojn, evitu ripeton.

Alvokoj kun komerca karaktero aŭ tiaj sen ĝenerala karaktero ni akceptas nur kiel pagataj anoncoj. (Redakcio).

Internacia Gdanska Foiro

Direkcio de Internacia Gdanska Foiro, kiu okazos de 2-a ĝis 10-a de aŭgusto 1947 akceptis kiel korespondlingvon Esperanton. Dum la ekspozicio funkcios Esperantogvidanto tra la tereno de la Foiro, kaj en la foira akceptejo oficos Esperanto-interpretisto. Marborda filio de Asocio de Esperantistoj en Pollando aranĝas en lasta tago de la Foiro

Internacian Esperantan Tagon

kui daŭros de 9-a aŭgusto vespere ĝis 10-a aŭgusto vespere. Polaj marbordaj Esperantistoj kore invitas ĉiujn Esperantistojn eksterlande, speciale tiujn, kiuj reveturante de Berna Kongreso povus sian vojon tra Gdansk kaj Gdynia trati. Ili povos ricevi malkaran loĝejon en esperantaj domoj kaj partopreni ĉiujn distraĵojn por ili speciale preparitajn, krom tio ili partoprenos la Foiro. Ne hezitu do kaj tuj aliĝu nian Internacian Tagon. Anoncoj direktiĝu al la Asocio de Esperantistoj en Pollando, Gdansk-Oliwa, Asnyka 2 (Polujo), A. Kozuchowski, aŭ rekte al la Direkcio de Foiro.

Internacia Ekspozicio de Infanaj Desegnaĵoj

La plej bona propagando por Esperanto estas montri ĝian utilecon. Pro tio la Esp. Societo de Lyon, Francujo, preparas Internacian Ekspozicion de Infanaj Desegnaĵoj, kolektitaj per Esperanto.

La celo de la ekspozicio estas montri, kiel infanoj vidas sian propran landon. Tial la desegnaĵoj prefere devas prezenti tipajn pejzaĝojn aŭ scenojn de la koncernata lando.

La infanoj devos esti maksimume 14-jaraj je la 31 decembro, 1947. Uniforma formato de la desegnoj: 21 × 27 cm.

Malsupre de ĉiu desegnaĵo estu menciata: la nomo, antaŭnomo, aĝo, urbo, lando de la aŭtoro, kaj eventuale la lernejo.

La ekspozicio okazos dum venonta aŭtuno, en *Palais du Conservatoire*, kie okazas ĉiuj artaj ekspozicioj. La publiko estos invitata ĝin viziti per la gazetoj, la radio, la afiŝoj, per kartoj permesantaj eniri je reduktita prezo. Ĝi estos solene inaŭgurata kun ĉeesto de la aŭtoritatoj.

Grandaj tabuloj klarigos, kiel Esperanto permesis la kolektadon de la desegnaĵoj.

Tiu valora propagando ne interesas nur Lionon, sed ĉiujn urbojn, kiuj dezirus ĝin profiti. Post la ekspozicio, la Liona Esp. Societo metos la tutan materialon je la dispono de aliaj Esp. grupoj.

Esp. geinstruistoj en la tuta mondo, aŭskultu nian alvokon. Instigu viajn lernantojn partopreni la ekspozicion. Ni precizigas, ke infanoj povas ankaŭ rekte sendi al ni desegnaĵojn.

Se la ekspozicio bone sukcesos finance, premioj estos donataj por la plej bonaj sendaĵoj.

Ĉio permesas esperi, ke tiu ekspozicio altiros vastan publikon kaj trafe montros la utilecon de Esperanto.

Ni antaŭe dankas tiujn, kiuj aŭdos nian alvokon kaj helpas je ĝia sukceso.

Sendu la desegnojn al la prez. de la Liona Esperantista Societo: Richard Levin, 55 Avenue F. Faure, Lyon, Francujo.

Esperanto En Naturscienca Bulteno

La Entomologia Societo de Mulhouse (Francel.) akceptis Esperanton. Ĝia monata bulteno, ilustrita, bone prezentita (8 ĝis 16 paĝoj) enhavas resumojn en E. de ĉiu artikolo. La anoncoj, dulingvaj, estas senpagaj por la membroj. Jarabono (eksterl.) 150 fr. fr. aŭ 10 respond-kuponoj. Kotizojn oni sendu ĉu al Esperantista Unuiĝo Franca, 34 rue Chabrol, Paris 10 (Poŝtĉeko 855-35 Paris), ĉu rekte al la subskribinto (poŝtĉeko 167-22 Strasbourg). Interŝanĝo dezirata kun natursciencaj revuoj tutmondaj. Samideanoj samcelemaĵ sendu adresojn de tiaj fakrevuoj (fariĝu ilia peranto kaj E.-korespondisto!) kaj de insektojn-kolektantaj societoj, firmoj, unuopaj entomologiistoj, profesoroj, instruistoj. Demandu la necesan kvanton da specimenoj senpagaj (afrankaĵo 1 resp. kup.) Al pluraj respondintoj el la sama lando mi sendos la adreson de la unua, por ebligi interkonsenton pri komuna agado. Nepre kunhelpu multaj, por firmigi kaj pliampleksigi la atingitan sukceson.

Reciproke servopreta, la E.-korespondisto de ESM: UEA-del. Alb. Lienhardt, 24 Faubg. de Riedisheim, Mulhouse (Francel.)

Socialistoj

La Hungara Socialdemokrata Partio, Budapeŝto, eldonis en angla kaj franca lingvoj multobligitajn kalendarojn kun raporto pri sia partia kongreso. La Partio estus preta eldoni estonte tiajn raportojn kelkfoje ankaŭ en Esperanto, se sufiĉe multaj serioze interesigantoj, precipe socialistoj, partiogrupoj, laboristoj grupoj, ĵurnalistoj, delegitoj, petus ilin. Kiun interesas la hungara laborista movado, skribu!

32a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, Svisujo. 26 Julio-2 Aŭgusto, 1947

Adreso por ĉiuj komunikadoj, Bundesgasse 20, Bern

9a listo de kongresanoj

860. F-ino E. Steinmetz, Sioux Falls, Usono
861. S-ino F. Shaver, Sioux Falls, Usono
862. S-ro R. J. Van Eynde, Wilrijk, Belgujo
863. S-ino R. D. Van Eynde, Wilrijk, Belgujo
864. F-ino A. Van Eynde, Wilrijk, Belgujo
865. L.-G. Du Pasquier, Neuchâtel, Svislando
866. Todor Dimitrov, Plovdiv, Bulgario
867. F-ino N. T. Karlsson, Kumla, Svedujo
868. M. Blicher, Kopenhago, Danlando
869. S-ino E. Blicher, Kopenhago, Danlando
870. S-ino A. C. Jonsson, Stockholm, Svedujo
871. F-ino I. Persson, Hindby, Svedujo
872. L. Lundell, Malmö, Svedujo
873. F. Löfgren, Malmö, Svedujo
874. C. O. Östling, Trelleborg, Svedujo
875. E. W. Andersson, Malmö, Svedujo
876. L. S. Claussøn, Malmö, Svedujo
877. S-ino H. Nansen, Malmö, Svedujo
878. S-ino M. Buchholz-Wyss, Stuttgart, Germanujo
879. F-ino J. Buchholz, Stuttgart, Germanujo
880. S-ino A. Frysová, Praha, Ĉeĥoslovakujo
881. F-ino A. Frysová, Praha, Ĉeĥoslovakujo
882. F-ino M. Hauzalová, Praha, Ĉeĥoslovakujo
883. B. P. Sharma, Newcastle-on-Tyne, Britujo
884. S-ino E. Greenwood, Blackburn, Britujo
885. S-ino L. Schofield, Brierfield, Britujo
886. F-ino E. Smith, Burnley, Britujo
887. H. W. Watson, Oxford, Britujo
888. F-ino D. A. Wescott, London, Britujo
889. S-ino D. Wescott, London, Britujo
890. J. M. Wescott, London, Britujo
891. J. F. Harris, Smethwick, Britujo
892. S-ino B. Kempeneers, Uccle, Belgujo
893. S-ino L. Sifco, Uccle, Belgujo
894. S-ino J. L. L. Plyson, Bruselo, Belgujo
895. F-ino R. I. M. Jonsson, Stockholm, Svedujo
896. F-ino R. E. K. Jonsson, Stockholm, Svedujo
897. B. S. G. Asp, Stockholm, Svedujo
898. F-ino L. Thulin, Johannishus, Svedujo
899. F. Fernström, Hälsingborg, Svedujo
900. S-ino A. L. Alamo, Stockholm, Svedujo
901. A.-C. Van De Velde, Gent, Belgujo
902. S-ino M.-J. Van De Velde-Lycke, Gent, Belgujo
903. S-ino J. Buil-Podevijn, Aalst, Belgujo
904. S-ino P. Podevijn, Aalst, Belgujo
905. F. Roosen, Aalst, Belgujo
906. S-ino C. Roosen, Aalst, Belgujo
907. F-ino P. L. De Cock, Aalst, Belgujo
908. F-ino G. Henningson, Slöinge, Svedujo
909. F-ino H. Holmkvist, Slöinge, Svedujo
910. R. Moholm, Odense, Danlando
911. F-ino S.-C. Linnander, Stockholm, Svedujo
912. F-ino A. Bjurman, Borlänge, Svedujo
913. D. Zankay, Esztergom, Hungarujo
914. S-ino Zankay, Esztergom, Hungarujo
915. F-ino A. Bernaerts, Lier, Belgujo
916. F-ino R. Van Loock, Lier, Belgujo
917. F-ino O. Fregonara, Nice, Francujo
918. F-ino C. Fregonara, Nice, Francujo
919. D. Petrin, Bucuresti, Rumanujo
920. S-ino N. Petrin, Bucuresti, Rumanujo
921. S-ino G. Harabagiu-Nahamovici, Bucuresti, Rumanujo
922. F-ino A. R. Sutter, Bern, Svislando
923. A. Palmqvist, Malmö, Svedujo
924. S-ino B. Palmqvist, Malmö, Svedujo
925. A. E. Persson, Malmö, Svedujo

926. S-ino A. Persson, Malmö, Svedujo
927. E. R. Lindahl, Malmö, Svedujo
928. F-ino I. Martinsson, Malmö, Svedujo
929. E. R. T. Bonander, Karlskoga, Svedujo
930. S-ino G. S. Bonander, Karlskoga, Svedujo
931. F-ino A. M. Enström, Karlskoga, Svedujo
932. F-ino C. E. Holmblad, Karlskoga, Svedujo
933. O. R. Lindahl, Karlskoga, Svedujo
934. A. A. Bern, Karlskoga, Svedujo
935. C. H. E. Sandström, Norrköping, Svedujo
936. K. Gering, Karlskoga, Svedujo
937. R. Torres-Carreras, Barcelona, Hispanujo
938. M.-K. Klimowicz, Louvain, Belgujo
939. G. V. Holden, Southport, Britujo
940. S-ino E. Holden, Southport, Britujo
941. F. J. Rogers, Derby, Britujo
942. H. E. Nolan, Luton, Britujo
943. F-ino M. I. Rothwell, Huddersfield, Britujo
944. F-ino H. Johnson, York, Britujo
945. F-ino M. O. Langrick, Leeds, Britujo
946. S-ino S. Hogan, Leicester, Britujo
947. G. A. Funke, Karlskoga, Svedujo
948. I. J. H. Svensson, Tibro, Svedujo
949. V. E. Janheim, Kungsör, Svedujo
950. F-ino T. Sigurd, Skövde, Svedujo
951. F-ino A. Jennen, Bruselo, Belgujo
952. F-ino S. Obozinski, Bruselo, Belgujo

Statistiko

Argentino ..	2	Islando ..	27
Aŭstralio ..	2	Italujo ..	11
Aŭstrujo ..	1	Jugoslavujo ..	8
Belgiujo ..	38	Luksemburgo ..	1
Brazilo ..	8	Nederlando ..	6
Britujo ..	522	Norvegujo ..	2
Bulgario ..	3	Polujo ..	1
Ĉeĥoslovakujo ..	11	Portugalujo ..	3
Danujo ..	4	Rumanujo ..	3
Finnlando ..	3	Sud-Afriko ..	2
Francujo ..	12	Svedujo ..	140
Germanujo ..	8	Svislando ..	113
Hindujo ..	1	Usono ..	10
Hispanujo ..	1		
Hungarujo ..	2	(29 landoj) ..	952
Irlando ..	7		

Libera Fido

Antaŭ kelkaj monatoj fondiĝis en Anglujo La Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj kun la celo provizi centran punkton al kiu povos kunveni tiuj, kiuj deziras pripensi religiajn aferojn sen deviga akcepto de tradiciaj dogmoj. Liberala Kristanismo jam ekzistas en multaj landoj kaj celas rilatigi religion kun la pensado de la moderna mondo, elserĉi la veron kaj sekvi ĝin kien ajn ĝi kondukas, kaj ekzameni sen partecio la opiniojn kaj vivon de aliaj Kristanoj kaj religianoj. Unu el niaj adeptoj diris "Ni havas tradicion, ke ni havas nenian tradicion." Ĝi estas vere libera fido. Pri la agado de la Unio, turnu vin al S-ro W. E. Reeve, 32 Hillcourt Road, LONDON, S.E.22, Anglujo.

32a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, 26 Julio ĝis 2 Aŭgusto, 1947

Definitiva Programo

<i>Tago</i>	<i>Horo</i>	<i>Programero</i>	<i>Ejo</i>
Sabato 26.VII	.. 15.30	.. Kunsido de la Estraro de UEA kaj de L.K.K.	Hotelo Metropole
"	"	.. Poste vizito de la kongresejo	Kazino
"	.. 20.15	.. Interkonatiĝa vespero (en naciaj kostumoj se eble)	Kornhauskeller
Dimanĉo 27.VII	.. 8.00	.. Katolika Diservo en preĝejo Sta. Triunuo	Dreifaltigkeitskirche (Taubenstr.)
"	.. 9.00	.. Malfermo de la kongresa poŝtoŝicejo	Kongresejo-Kazino
"	.. 10.00	.. SOLENA MALFERMO DE LA 32a	Kazino, Granda Salono
"	.. 15.00	.. ESPERANTO-DISERVO EN LA KATEDRALO	Münster
"	.. 16.30	.. Fotografado de la kongresanaro	Sportplatz
"	.. 20.00	.. KUNSIDO DE LA UEA KOMITATO	"Schwellenmätteli"
"	"	"	Hotelo Metropole
Lundo 28.VII	.. 9.00	.. Ekskurso al Jaunpasejo	Kongresejo
"	.. 9.30	.. UNUA LABORKUNSIDO KONGRESA	Granda Salono, Kazino
"	.. 10.00	.. Rondveturo tra Bern	Kongresejo
"	.. 14.00	.. Kunveno de Kooperativa E-Ligo Tutmonda E. Ĵurnalista Asocio	Uebungssaal
"	"	.. Kristana E. Ligo Internacia	Schützenstube
"	.. 14.00	.. Ekskurso al Schwarzsee	Burgerrats-Saal
"	"	.. Rondveturo tra Bern	Kongresejo
"	.. 15.00	.. KUNSIDO DE UEA KOMITATO	Hotelo Metropole
"	.. 20.15	.. Preleg-vespero de Esp.-verkistoj	Granda Salono
Mardo 29.VII	.. 7.00	.. Ekskurso al Sustenpasejo	Kongresejo
"	.. 8.30	.. Ekskurso al Niessen	Ĉef-stacidomo
"	.. 9.30	.. DUA LABORKUNSIDO KONGRESA	Granda Salono
"	.. 10.30	.. Rondveturo tra Bern	Kongresejo
"	.. 11.00	.. Kunveno de Katolikoj	Burgerrats-Saal
"	.. 14.00	.. Kunveno de Int. Instruista kunlaboro	Uebungssaal
"	"	.. La Bar-rompantoj	Burgerrats-Saal
"	"	.. Asocio de poŝtmarkkolektantoj	Schützenstube
"	.. 14.00	.. Ekskurso al Corniche	Kongresejo
"	"	.. Rondveturo tra Bern	Kongresejo
"	.. 14.30	.. E.-Rotarianoj : Lunĉo je la 12.15 ĉe la Bernaj Rotarianoj	Hotelo Bristol
"	.. 16.30	.. Pacifista Kunveno	Foyer, Kazino
"	.. 17.00	.. KUNSIDO DE UEA KOMITATO	Hotelo Metropole
"	.. 20.15	.. KONCERTO	Granda Salono de la kongresejo
Merkredo 30.VII	.. 6.30	.. Ekskurso al Jungfrauĵoch	Ĉefstacidomo
"	.. 9.00	.. Ekskurso tra urboj kaj vilaĝoj	Kongresejo
"	.. 9.30	.. I.L. de Esp. poŝt- kaj Telegraf-oficistoj (P.T.T.)	Hotelo Metropole
"	.. 9.30	.. Al Abundo (Unua kunveno)	Uebungssaal
"	.. 9.30	.. Psika esploro—spiritismo	Burgerrats-Saal
"	.. 10.00	.. Rondveturo tra Bern	Kongresejo
"	.. 14.00	.. Universala Ligo	Granda Salono
"	.. 14.00	.. Tutmonda E.-Kuracista Asocio	Schützenstube
"	.. 14.00	.. KELI; dua kunveno	Burgerrats-Saal
"	.. 14.00	.. Ekskurso al Chasseral	Kongresejo
"	.. 14.00	.. Rondveturo tra Bern	Kongresejo
"	.. 20.15	.. VARIETEA VESPERO	Granda Salono

<i>Tago</i>	<i>Horo</i>	<i>Programero</i>	<i>Ejo</i>
Ĵaŭdo 31.VII	.. 6.30	.. Ekskurso al Jungfrauĵoch ..	.. Ĉefstacidomo
" "	.. 8.00	.. Ekskurso al Col de Pillon ..	.. Kongresejo
" "	.. 9.00	.. I.L.E.P.T.T. (fervoj.) ..	.. Hotelo Metropole
" "	.. 9.00	.. Oxford-grupo ..	.. Burgerrats-Saal
" "	.. 10.00	.. TRIA LABORA KUNSIDO ..	.. Granda Salono
" "	.. 10.00	.. Rondveturo tra Bern ..	.. Kongresejo
" "	.. 14.00	.. Bahaismo ..	.. Schützenstube
" "	.. 14.00	.. Ekskurso al Trümmelbach ..	.. Kongresejo
" "	.. 15.00	.. KUNSIDO DE UEA KOMITATO ..	.. Hotelo Metropole
" "	.. 20.30	.. KONGRES-BALO ..	.. Kazino
Vendredo 1.VIII	.. 8.00	.. Granda Jura-veturado ..	.. Kongresejo
" "	.. 9.30	.. Filmo kaj prelego pri Svedujo ..	.. Granda Salono
" "	.. 10.00	.. Rondveturo tra Bern ..	.. Kongresejo
" "	.. 11.00	.. Int. Instruista Kunlaboro ..	.. Uebungssaal
" "	.. 11.00	.. Al Abundo (Dua kunveno) ..	.. Burgerrats-Saal
" "	.. 11.00	.. Kooperativa Esp. Ligo ..	.. Schützenstube
" "	.. 14.00	.. Policista Ligo ..	.. Schützenstube
" "	.. 14.00	.. Denaska Esperantistaro ..	.. Uebungssaal
" "	.. 14.00	.. Psika esploro—spiritismo ..	.. Burgerrats-Saal
" "	.. 14.00	.. Ekskurso al 3 lagoj ..	.. Kongresejo
" "	.. 14.00	.. Rondveturo tra Bern ..	.. Kongresejo
" "	.. 16.00	.. Lumbild-konferenco pri Nov-Zelando ..	.. Uebungssaal
" "	.. 20.00	.. SVISA NACIA FESTO ..	..
Sabato 2.VIII	.. 6.00	.. Granda transalpa veturado ..	.. Kongresejo
" "	.. 9.30	.. SOLENA FERMO DE LA 32a KONGRESO DE ESPERANTO	.. Kongresejo
" "	.. 14.00	.. Ekskurso al Emmen-Valo ..	.. Kongresejo

Recenzoj (de paĝo 99)

pri *kreado* de universala lingvo, sed pri *universaligo* de la Latino. Tion li priparilas en sia verko *Blanquerna*.

S-ro Carreras priparolas la idearon de Lull kaj klare montras, ke ĝi influis dum jarcentoj la Eŭropajn pensulojn, kaj precipe la junan Leibniz, kies *Dissertatio de Arte combinatoria* estas efektive alfaro de la verko de Lull, *Ars Magna*, sur la pensaj ŝablonaĵoj de Descartes.

Kritikinda en la verketo estas nur tio, ke li ne paŝas preter Leibniz. Neniun el la provoj de la deknaŭa aŭ dudeka jarcentoj li citas, kaj la solvon li eĉ ne aludas. La vorto *Esperanto* ne troviĝas en lia studo. La broŝuro tamen estas interesa pri la periodo.

J. Régulo Pérez,
Kanariaj Insuloj

La spirita ĉarto de l'homaro : Penadoj celantaj altiĝi la nivelon de la homa vivado spirita, meritas ĉiam nian atenton. La ciklostile presita pamfleto kun supra titolo varbas por spirita ĉarto (principaro) de l'homaro. Samideanoj kiuj havas intereson por tiu ĉi celado petu informon de National Committee W.S.C., Eldon Lodge, 52 Victoria Road, London, W.8.

H.J.

Kion ni povas konkludi ? (de paĝo 101)

teksto. Se ni konjektus el tio, ke por kompreni legi romanon de 100.000 vortoj, ni devus ankaŭ en Esperanto trovi el vortaro aŭ diveni 6000 vortojn, ni venus al tute malgusta rezulto. Nome, studinte tiamaniere 40.000 vortojn da Esperanta teksto, ni jam posedus krom la originaj 1100 vortoj, 2400 novajn, sume 3500 vortojn, kaj tiam ni jam praktike neniam bezonus la helpojn de vortaro por legado de komuna teksto. En angla lingvo, simila rezulto eble estas atingita, kiam oni lernas 40.000 malsamajn vortojn.

Kion oni povas profiti el ĉi tiu scio ? Unue, por la instruado, oni povas kunmeti normajn listojn da plej bezonaj vortoj, gradigitajn laŭ ilia graveco por la komuna lingvo. La objekto de instruado devus kompreneble progresi laŭ la montroj de tiuj listoj. Due, kiam ni bezonas malgrandajn vortarojn de la lingvo, kiel ekzemple la *Stosilo*, ni devas elekti la vortprovizon laŭ la instrukcio el ili ricevebla.

Vilho Setälä, Finnlando

INTERNACIA KONFERENCO, PARIZO 1948

pri nuntempaj problemoj politikaj, ekonomiaj kaj intelektaj
Parizo, Pentekosto 1948

Unua komunikilo

Adreso por korespondadoj : 34 rue de Chabrol,
Paris, 10

Vi jam legis en *Heroldo de Esperanto* kaj en diversaj gazetoj mian artikolon *Tagiĝas* pri la internacia konferenco, kiu okazos en Paris en 1948. Kial organizi tiujn konferencojn ?

1. Ĉar nuntempe la demando pri internacia lingvo fariĝas pli kaj pli aktuala. Pluraj projektoj kiel Basic English, Interlingua de I.A.L.A., Occidental, kun ŝtata aŭ kapitalista apogoj sin trudis al la publiko kiel la lastaj kaj la plej bonaj solvoj de la problemo. Fakte, tiuj projektoj vivas nur en la cerboj de ties propagandistoj.

2. Gravaj problemoj sin prezentas al la politikistoj, ekonomiistoj, sciencistoj, intelektuloj de ĉiuj landoj pri la nunaj kaj estontaj vivkondiĉoj de la homaro. Sed neniam la ŝtataj interesoj permesas larĝe diskuti tiujn gravajn problemojn. Estas pro tiuj du kaŭzoj, ke ni organizas la konferencojn. Ni unue montras al la publiko, ke Esperanto ne plu estas, kiel aliaj projektoj, nur projekto de internacia lingvo, sed ke ĝi jam de longe fariĝis fakte vivanta lingvo, la *lingvo internacia*.

Aliflanke, la gravaj neniam diskutitaj problemoj estos studataj detale de la preparaj komisionoj de la Konferenco kaj gravaj debatoj en nura lingvo Esperanto larĝe malfermataj al la politikistoj, ekonomiistoj, sciencistoj, intelektuloj de la tuta mondo, permesos eble al ili pacajn rimedojn por elpuŝi la mondon el la nuna ĉiuspeca haoso.

Ni opiniis necesa demandi por la preparaj komisionoj la kunlaboron de multaj personoj, kiuj afable, larĝanime, kaj science, sukcesigis la konferencojn de 1937 *Esperanto en la moderna vivo*. Ni tamen tuj montras la gravan diferencon inter la konferenco de 1937 kaj de la antaŭaj kun tiu de 1948. Por la unuaj Esperanto estis la celo, por la venonta, Esperanto estos la ilo, la mirinda interkomprenigilo. Ni deziras tuj doni al vi la unuan liston de la organizantoj de la Konferenco. Al tiuj nomoj aliaj estas aldonataj.

1. Komitato :

Prezidanto : S-ro Pierre Petit, Asekurkonsilanto, Diplomito de la Pariza Jura Fakultato pri financaj kaj administraj studoj, Prezidanto de U.E.F.

Vic-Prezidanto por Francujo : S-ro Intendant-Generalo L. Bastien, Prezidanto de Internacia Esperanto-Ligo.

(Aliaj Vic-Prezidantoj estos nomataj po unu por ĉiu lando partoprenanta la konferencojn).

Ĝenerala Sekretario : S-ro J. Guillaume, inĝeniero, Teknika Direktoro.

Helpsekretario : F-ino Mireille Ronchy, Licenciatino pri Juro kaj Beletristiko de la Pariza Universitato.

Ĝenerala kasisto : S-ro Roger Bernard, industriisto.

Nota de la redakcio : Ni konigas tie ĉi la unuan parton de detala informo pri tiu ĉi konferenco. En la sekvonta numero sekvos informoj pri la diversaj komisionoj teknikaj kaj pri la temoj diskutotaj. Manko de loko en nuna numero malebligis enpresigi la tuton.

Dueco

*"Mi serĉas vin denove ĉiun tagon.
Ĉu ĝoje, ĉu profunde en doloro,
Ekkonu : la amanta homa koro
Aspiris vin kaj de Amor' la sagon.
Neniam plendas mi rapidan agon,
Se eĉ tre ofte ŝajnas kruda horo
Traskui min, ne kreu ke la ploro
Ekvengos idealan la imagon.*

*Ardadas jen konstanta la sopiro
Al vera varm' en mi ; ĝin kontentigu
Per plejvolonta sindonem'."—La viro
Silentas, sed li sentas firman
Duecon ĉirkaŭitan. Vi ekstarigu
Nun la duan muron ŝirman.*

*Originale de J. Suchy,
Gross-Gerau, Germanujo*

La Kastelo de Chillon (Lord Byron 1788–1824)

*Libereco, la Spirito de l' animo !
Nepre en subtera ĉelo Via gloro
Brilas, ĉar Vi loĝas tie en la koro
Kiu pulsas nur pro Via alproksimo.
Kiam oni ĉenas pro ideo krimo
Viajn filojn, for de luno kaj mondverdo,
Ties lando venkas per ilia perdo,
Via nomo ĉie gajnas de l'estimo.
En Chillon la ĉelo estas sankta loko,
Kaj altaro ties planko al Espero.
Jen, la piedmarkojn sur la daŭra roko
Paris Bonivard ! pri kies sinofero
Ili ĉiam diros, kaj per koralvoko
Pledos kontraŭ tiraneco sur la tero.*

Brendon Clark, Nov-Zelando

KELKAJ OPINIOJ PRI VERSTRADUKADO

En la Aŭgusta numero de *Esperanto Internacia* mi publikigis kelkajn teoriojn pri verstradukado en Esperanton. Pluraj samideanoj — iuj tre konataj — skribis al mi detalajn komentojn. Mi kore dankas ilin kaj aldonas mallonge ties opiniojn:

S-ro Bernard Long (Anglujo) skribas: “Laŭeble, fideleco al ritmo de nacia lingvo povas doni pli ĝustan ideon de la originalo al alilandaj legantoj. Sed mi ne volas starigi regulon tiurilate.”

S-ro T. Pendlebury (Anglujo) skribas: “Certe vi pravas pri la uzado de pli longaj ritmoj prefere ol lamigi la sencon aŭ vorton per tro da apostrofoj kaj aĉaj kunmetaĵoj (aŭ: kunjetaĵoj).” S-ro P. skribas ankaŭ: “Do, kiel vi diris, la Esperanta heksametro sonas pli mallonga ol la Angla, sed oni povas ankaŭ pliiĝi tiun mallongŝajnon se oni aranĝas, ke la unua silabo havu malfortan akcenton.” Li montras trafajn ekzemplojn.

S-ro A. Soares (Francujo) tute aprobas. Li citas: “Jam delonge oni krimas ĉe la Esperanta poezio ĉar la amatoroj sin esprimas laŭ sia propra fantazio.” Kaj li aldonas: “Mi kredas, ke fine vi trovis la *ĝustan* ŝlosilon por la Esperanta poezio konsilante la trokeajn kaj amfibrakajn finaĵojn. La versoj iĝas tiel pli belsonaj kaj pli fundamentaj.” Mi dankas al S-ro Soares.

S-ro Mason Stuttard (Anglujo) skribas: Mi devas konfesi, tamen ke vi genie solvis la problemon. Mi volas fari al vi nur unu demandon pri la anstataŭigo de ritmo. Vere estas, ke interne de verso (post kiam oni deprenis la komencon kaj finon) la jambo kaj trokeo estas egalaj. Tamen, kiel vi respondas la demandon pri la, ĉu mi diru, ritma spirito de verko? Laŭ mia kompreno — kaj laŭ opinioj ofte legeblaj — poeto elektas sian ritmon, eble ne konscie sed ja elektas, por konformi al la humoro de la penso. Laŭ tio, la komenca silabo ja havas gravecon . . . Ŝajnas al mi, ke per trokea komenco kaj daŭrigo, oni plivigligas la ritmon kaj ankaŭ la sugestion.” (Mi respondas, ke mia opinio, ne la ritmo, sed la longeco de la vokaloj fiksas la humoron. Per tute sama ritmo oni povas skribi dignecon poezion aŭ ridigan arlekenajon. Ĉiuokaze, mi volas emfazi, ke tradukante jambojn per trokeoj, oni estigas la saman dignecon *nur plilongigante la metrikon*). Daŭrigante, S-ro M.S. skribas: “En la ekzemploj de vi donitaj mi opinias, ke la uzo de heksametroj pli ol kompensas la mankon de pentametroj. La vero estas, ke ĉiu traduko estas ĝis grado nova poemo, kaj la mirindaj faroj de iuj poetoj — plej elstara kredeble tiurilate estas Fitzgerald — tute pravigas la eksperimentadon per novaj metrikoj, eĉ per novaj rimoj.”

S-ro Vilho Setälä (Finnujo) skribas: “Certe li

(S-ro Clark) estas prava en la ĉefaj principoj: la Esperanta traduko de poemo ne devas celi al laŭvorta redono de la ekstera formo de la originalo; ĝi devas esti poemo en si . . . Kio koncernas la metrikon, ŝajnas al mi — kiom mi komprenas la Anglan lingvon — ke S-ro Clark estas prava en tio, ke la Anglaj versoj ofte estas pli bone tradukeblaj kun aldonado de unu verspiedo. Sed en lia provo el la *Ronda Tablo*, mian neanglan orelon ofendas la oftaj troaj silaboj en la komenco de verso . . . Kiel tiaj troaj silaboj, ne ĝenas la tute mallongaj *ne, la*; eĉ la prefiksoido *pli* estas akceptebla, sed la longaj *kaj, sed*, kaj precipe *long* estas pezaj kaj evitindaj.” (Grava punkto, pri kiu mi precipe deziris la opinion de alilingvanoj. Mi dankas). S-ro S. ankaŭ traktas detale pri la ritmo de *Hiavata*.

S-ro Martti Putaala (Finnujo) skribas: “Pri la tradukado de nacia poezio en Esperanton vi certe havas ĝustan opinion, laŭ mi. Sed en ĉiu okazo oni ne devas esti tro laŭlitera rilate al la ritmo de originalaĵo; en alia kazo, mi timas, ĉiuj naciaj poemoj ne estas tradukeblaj en Esperanton . . . Nia (Finna) lingvo havas ĉefparte longajn multisilabajn vortojn kun akcento ĉiam sur la unua silabo. Do la trokeo kaj daktilo ŝajnas preskaŭ solaj rimedoj por Finna poeto . . . laŭ mi, la tro multaj apostrofoj kiel signoj de mallongigo en la Esperantlingva poemaro malbeligas la poemojn kaj tro klare montras mankon de la lingvo por versverkado, aŭ pli ĝuste, la oftaj apostrofoj donas malĝustan opinion pri eblecoj de nia lingvo al ne-esperantistoj. Ĉu ne estus pli bone tute forlasi la apostrofon en la Esperanta poezio?” (Kiu mallongigas vorton kaj ellasas la apostrofon, konfesas, ke li trovas la elizion kaŝinda afero. La elizio *ne estas necesa*, krom por emfazo, kaj dume ĉe kantoj. Mi mem jam verkis 32 poemojn en Esperanto — 8 originalajn, 24 tradukitajn; entute 1,031 versojn; kaj nur unufoje mi eliziis la o).

S-ro Ernest G. Dodge (Usono) skribas: “Mi konsentas kun vi, ke en originala Esperanta poezio, la verkanto plej ofte trovas konvene eviti la versformojn en kiuj la versoj finiĝas per akcenta silabo. En tradukado la afero estas malpli simpla . . . Ne ekzistas ia nepriga regulo pri tio.” (Kun respekto mi tamen sugestas, al S-ro D. ke la genio kaj ecoj de Esperanto mem postulas, ke ĉiuj Esperantaj versoj, krom ĉe kantoj, pronomoj k.c. nepre finiĝu per senakcenta silabo, konforme al nia konata Esperanto. Kial oni uzu iun vortformon por la prozo, kaj tute alian por la poezio?)

S-ro D. sugestas ankaŭ, ke ĉe senrimaj versoj, anstataŭ plilongigi la metrikon, oni povas aldoni po unu verslinio tie kaj tie. (Mi rimarkis, ke Zamenhof tion faris ĉe *Hamleto*). Sendube tio povas esti utila rimedo, sed precipe ĉe mallongaj versoj (ekz. ĉe *Hiavata*). Ĉe longaj versoj, tiu metodo ne forigas la problemon pri la malsama sentempo inter la originalo kaj la traduko.

S-ro D. kontraŭstaras ŝanĝon de metriko ĉe *Hiavata*, poemo kiun li amas de la knabeco. Kaj mi devas konfesi, ke mi malbone elektis, eksperimentante per tiu konata poemo, kies ritmo estas ties ĉefa trajto. Tamen, mi ankoraŭ sentas, ke la pentametra traduko de *Hiavata* sufiĉe sugestas la tetrametrojn de la originalo.

S-ro D. Staritsky (Ruso en Nederlando) skribas: Laŭ ritmo kaj kadenco de la tradukitaj versaĵoj mi konjektas ĉu ĝi estas bona aŭ ne. Se ĝia ritmo estas la sama kun la originalo—do ĝi estas (miaopinie) bone tradukita." Ankaŭ S-ro S. kontraŭstaras la ŝanĝon ĉe la metriko de *Hiavata*, kiun li lernis dum knabeco, per bona Rusa traduko.

S-ro Bertram Potts (Nov-Zelando), leginte mian artikolon, sendis al mi albumon de poemoj, kiujn li verkis antaŭ 20 jaroj. Li atentigis min pri la fakto, ke paŝon post paŝo tra la poemoj, li fine alvenis al la sama konkludo kiel mi, rilate al la tuta evito de la elizio, la uzado de trokeoj kaj amfibrakoj anstataŭ jamboj kaj daktiloj, kaj la plilongigo de la metriko.

Jen do aprobo kaj malaprobo. Antaŭ ol lasi la aferon, mi volus aldoni tri pliajn pensojn:

(1) Por kiuj ni tradukas? Ĉu por la samlingvano, kiu insistas ke ni konservu la originalan formon, eĉ tiucele kripligante la Esperanton, aŭ ĉu por la alilingvano, kiu neniel komprenas la originalon kaj nur volas eltrovi, per simpla kaj plaĉa Esperanto, kion diras la poemo?

(2) Ĉio, kio laŭlingve ne estas tuj komprenebla, estas malbona. Povas esti, ke la ideo, kiun la poeto penas esprimi, estas neklara—tio estas la afero de la poeto; sed la lingvo, kiu estas la afero de la tradukanto, devas esti neniam neklara! Kaj la klareco postulas: neniom da elizio; neniom da nebezonataj neologismoj; nenium neordinaran vortordon; nenium kunpremon de malsimpla ideo en unu kunmetitan vorton.

(3) Oni uzas elizion nur pro du kialoj: unue, ĉar oni ne sufiĉe havas la lingvon por eviti ĝin; due, ĉar oni ne povas liberigi sin el la influo de la naciaj lingvoj. "Ĉar mia lingvo havas jambojn, ankaŭ Esperanto havu jambojn, vole-nevole." Kiu deziras *virajn* ritmojn, tiu trovos ilin en la *viraj* lingvoj.

Eble la plej konata poemo en la tuta Angla literaturo estas la tradukita de Fitzgerald *Rubáiyát de Omar Khayyám*. Sed kiom da

Angloj rompas la kapon komparante la tradukitan formon kun la Persa originalo? Permesu tamen ke mi fine citu du eminentulojn kiuj ja faris tiun komparon. La kursivoj estas miaj:

"La beleco de formo en ia literatura verko neeviteble perdiĝas pro tradukiĝo, kvankam ĝi povas esti *iom anstataŭita* aŭ imitita en lerta traduko; sed la beleco kaj forto de ideoj devus esti facile konserveblaj tiel, ekzemple, ke oni povas diri, ke la genio de Fitzgerald entute esprimas la belajojn de la verskvaroj de *Omar Khayyám*." (Prof. E. G. Browne, Cambridge, en *Literatura Historio de Persujo, de Firdawsi ĝis Sa'di* p. 142).

"Fitzgerald alprenis la solan metrikon kiu taŭgas por verskvaroj . . . po dek silaboj en ĉiu verso. Iom da metrika konformeco ekzistas inter la metriko de la originalo kaj tiu de la traduko, kaj kvankam la akordiĝo tiurilate ne estas perfekta, *almenaŭ ĝi sugestas la originalon*. Aleksandriaj versoj estus eĉ pli taŭgaj, . . . kaj Germanaj tradukintoj de la *Rubáiyát de Omar* jam uzis ilin; sed kion S-ro E. H. Winfield montris, tiu metriko *ne konvenas al la Angla lingvo*." (El la *Enkonduko* de Syed Abdal Majid al la *Rubáiyát de Hafiz* p. 37).

Ĝuste kiel la "pli taŭgaj aleksandriaj versoj" uzitaj de la Germanaj tradukintoj "ne konvenas al la Angla lingvo", tiel same la jambaj versoj ne konvenas al Esperanto.

Brendon Clark, Nov-Zelando

La Leganto Parolas

S-ro R. Schroevers (Nederlando) skribas: Mi rimarkas, ke pri la Petskribo "Komercestoj" okupas unuan lokon rilate okupojn. Trifoje ĉiusemajne mi ricevas en mia kontoro gazeton *Ekonomia Instruservo*. En ĉi tiu gazeto troviĝas rubriko *Komercperado*, en kiu oni donas detalan nomadon de eksterlandaj fabriкеjoj kaj firmoj, kiuj serĉas interrilatojn kun Nederlandaj fabrikistoj, ekspedistoj, importistoj k.t.p. La anoncintoj aldonas la lingvon per kiu oni povas korespondi. Ĝis ĉi nun mi ne legas *Esperanto*! Strange!

Pli ol 40,000 komercestoj kaj oficistoj subskribis la Petskribon. Kiam mi legos *Korespondado Esperanlingve*? Komercestoj, oficistoj, komprenu vian devon!

Aŭstra Esperanto Kongreso okazos la 29-31 Aŭgusto 1947 en Kufstein, Tirol. Por prui al la publiko la disvastiĝon de Esperanto tra la mondo, ni petas Esp.-organizaĵojn kaj la Esperantistaron, ke ili bonvolu sendi salutleterojn aŭ kartojn al: Esperanto-Kongreskomitato, prezidanto D-ro Alfons Huber, Kufstein Zell, Tirol, Aŭstrujo.

ENIGMA KONKURSO N-ro 17

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo


Solvoj de la enigmoj en Konkurs N-ro 15

N-ro 35 : Tiuj, kiuj ĉesis solvi la enigmojn, rekomencu. La premioj valoras la penon kaj la afrankojn. La jam akiritaj poentoj validas ĝis unu jaro post la lasta ensendo.

N-ro 36 : Post sufero venas prospero. Kiom da homoj, tiom da gustoj. Ŝlosilvortoj : impliki, amortizi, gastronomo, determini, kaskado, klubkasisto, infanhorloĝo, stereometrio, miriametro, prognozo, levkojo, kreditoro, kontribui, staniolfolio, kostumo, kaptado, korelativo, teologio, instruisto, cipreso, kremotorto, kuratoro, sportujo.

N-ro 37 : Kiam la hormontrilo (hm.) troviĝas 28 minutostriojn (ms.) preter la cifero kiun ĝi laste preterpasis, tiam estas 36 minutoj post iu horo ; kaj tiam la minutmontrilo (mm.) do ne

Enigmo N-ro 41 : Krucvort-enigmo.



Horizontale :

1. rabobirdo(r)
4. longkrura birdo(r)
8. ronda disko, turniganta ĉirkaŭ centra akso(r)
11. instruita(r)
13. legomo kun dika manĝebla radiko(r)
14. konifero
15. enpiki sub la haŭton neforigeblajn desegnaĵojn
17. skriba publika diskutado(r)
19. nun ŝatata de viroj kaj virinoj(r)
21. treege alloga senkompata koketulinio(r)
23. uzata por movi ŝipon(r)
25. pagilo(r)
27. konstrumaterialo(r)
29. duonridi pro malica moko(r)
31. korelativo

troviĝas 9 ms. preter iu cifero. Estas do la hm. kiu troviĝas 9 ms. preter iu cifero, aŭ 4 ms. preter la cifero kiun ĝi laste preterpasis. Tiam la mm. troviĝas 48 ms. preter la cifero 12, aŭ 28 ms. preter la cifero 5. Tiam do estas la 5a horo kaj 48 minutoj.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la dektria konkurs : S-ro W. J. A. Manders (Ned.) 85p, Pastro D. W. Robson (Brit.) 83.5p, S-ro H. Westergaard (Dan.) 79p. Post ili sekvas : S-ro J. Yben 77.5p, S-ro Fr. Couwenberg 76p, F-ino J. J. v. Thiel 73.5p, S-ro J. S. Dinwoodie 72.5p, F-ino B. Bowell 72p, S-ino N. Koudys-Modoo 66p, S-ro Fr. Taylor 66p, S-ro H. de Kuyser 65p, F-ino E. Jayet 65p, S-ro P. E. Schwerin 64p, S-ro Ed. Decaneva 61p, S-ro T. K. Slade 60p, S-ro R. V. Salles 60p, S-ro A. E. Rosengard-Hansen 59p, S-ro H. Hasper 59p.

32. persona pronomo
33. kartludo(r)
34. longa kava cilindroforma ilo(r)
35. eksterigi siajn kapablojn(r)
36. malhavebla ilo por butikistoj(r)
37. tia bastono servas kiel promenilo
38. kuirvazo(r)
39. ĉarma infano(r)
41. skarлата floro en grenkampoj(r)
43. aktoro(r)
45. honora titolo donebla de episkopo al pastro(r)
47. devenigi vorton de alia pli simpla(r)
49. korpoparto(r)
50. parto de spaco destinita por io(r)
52. plektajo kun grandaj interspacoj inter la fadenoj
53. facile cedanta(r)
54. moderna armilo(r)
55. teksaĵo el lino(r)

Vertikale :

1. oficiala dokumento(r)
2. malraspa(r)
3. stato de ŝajna morto(r)
5. grupo(r)
6. legomo, kies tubera radiko estas manĝebla(r)
7. rakonta poezio(r)
8. longa mallarga leda strio(r)
9. membrino(r)
10. ŝipiparejo(r)
12. juvela diafana ŝtono, ordinare malhelruĝa(r)
14. tie oni atendas la alvenon de vagonaro(r)
16. korelativo
18. molusko(r)
20. metala armajo, ŝirmanta la korpon(r)
22. subtera kanalo tra kiu fluas malpuraĵoj(r)
24. poezio, kantanta la personajn impresojn de la poeto mem(r)
26. malriĉa dometo(r)
28. sufikso
30. senti fortan agiton kontraŭ iu, kiu ofendis nin(r)
31. korelativo(akuzativo)
33. infekta malsano karakterizata per fortegaj konvulsioj(r)
34. seĝeto(r)
36. tutajdo de la homoj, loĝantaj en sama lando(r)

37. manĝilo(r)
38. enkadrigita parto de muro, meblo(r)
40. eksterhavana parto de maro, kie ŝipo povas haltadi(r)
41. duo
42. kovrita de densaj mallongaj haroj
44. ripozejo
45. interpunkcia signo(r)
46. kortbirdo(r)
48. pli malpli energie uzi la spirantajn fortojn, per kiuj efektiviĝas la agoj(r)
51. konjunkcio.

5 poentoj

Enigma N-ro 42 : Kaŝ-enigma.

Kiuj radikoj de bestnomoj estas kaŝitaj en la ĉi-subaj frazoj? Se dufoje ekzistas la sama radiko, menciu ĝin nur unu fojon.

Tiu katafalco estas unika por sia multekosta karpena ligno. La kameleono kaj la kardelo estas malgrandaj bestoj. Malario kutime nur per kinino estos tre rapide kuracebla. Tiuj tabeloj toleras akuratan esploron. La saliko kreskas ofte apud akvo. Pli ol mil vortoj kiel makaronio, doganisto, merlango, pigmeo, kulpi, rolulo, ŝalupa servas por kaŝi la nomojn de bestoj.

Por ĉiu kompleta kvino de radikoj mi donos unu poenton.

LA PETSKRIBO

En la pasinta monato ni povis priatenti multajn foliojn kiuj kuŝis ĉe ni kaj la lastaj ciferoj montras rimarkindan kreskon. La kolektado, aranĝado, kaj ekspedo de la folioj jam funkcias laŭ preskaŭ rutina plano en la plimulto de landoj, kaj nur ĉe izolaj kunlaborantoj, ekzistas necerteco pri la metodo. Ni permesas al ni do realudi pri kelkaj detaloj en nia sistemo. Certe interesos legantojn eksci, ke ĉiu individua folio ricevas numeron, kaj la numero estas sinsekvaj de 1 ĝis la plej lasta registrita folio. La numerojn ni enskribas "bloke" en niajn registriilojn de *Okupoj* kaj *Landoj* tiel ke, se necese, ni povos retrovi iun folion. Tial estos klare al la leganto, ke estas tre necese, por ŝpari tempon kaj energion, ke la okupoj estu aranĝitaj laŭ kiel eble plej grandaj grupoj. La folioj mem estas konservataj en specialaj kartonaj skatoloj, kiujn ni fabrikigis, po mil en ĉiu skatolo. Jen kial estas nepre dezirinde, ke la folioj estu unuformaj laŭ formato. Grandaj folioj kun dekoj da subskriboj tute ne utilas, ĉar ne estas eble klasifiki ilin en la kadro de nia sistemo. La tuta afero estis klarigita en cirkuleroj, kiujn ni kompilis kaj dissendis, sed de tempo al tempo ni ricevas sendaĵojn, kiujn ni ne povas utiligi, sekve de tio, ke oni tute malatentis niajn instrukciojn.

Ekzistas necerteco pri *Eminentuloj*. Ofte ni ricevas folion kun nura indiko "Eminenta". Tio tamen ne sufiĉas por ni, ĉar kelkfoje oni indikis

la lokan urbestron kiel eminentan homon! Necesas doni detalojn pri la titolo kaj rango, se eble informojn pri la vivo kaj agadkampoj de la koncernata eminentulo, por ke ni povu publikigi tion en la estonteco. Tio ankaŭ helpas nin juĝi pri la kompara eminenteco de la subskribinto. La kategorio *Metiistoj Diversaj* preskaŭ ĉiufoje donas ĝenon. Oni ŝajne ne povas kompreni, ke tiu fako estas por tiuj metiistoj, *kiujn oni ne povas aliloke grupigi*, sekve ĝi devus ne esti tre ampleksa.

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis 6-a de Junio:

Landoj			
Nederlando	..	46627	Islando .. 4065
Francujo	..	27227	Hungarujo .. 3589
Britujo	..	24736	Portugalujo .. 3423
Ĉeĥoslovakujo	..	22901	Aŭstralio .. 3012
Bulgarujo	..	21463	Nov-Zelando .. 2495
Svedujo	..	16519	Egiptujo .. 1761
Norvegujo	..	12724	Svisujo .. 1583
Jugoslavujo	..	11740	Maroko .. 1034
Danujo	..	9101	Grekujo .. 630
Germanujo	..	8974	Palestino .. 485
Aŭstrujo	..	7325	Irlando .. 463
Polujo	..	7110	Urugvajo .. 460
Finnujo	..	6325	Kanado .. 325
Usono	..	6247	Hispanujo .. 275
Belgujo	..	5668	Ceteraj lokoj .. 817
Argentino	..	5370	
Italujo	..	4358	sumo .. 272961
Brazilo	..	4129	

Okupoj			
Artistoj	..	1622	Navigaciistoj .. 936
Delegitoj Komunumaj	..	412	Parlamentanoj .. 158
Dentistoj	..	429	Policistoj .. 1784
Desegnistoj	..	1741	Presistoj .. 2628
Dommastrinoj	..	37665	P.T.T.-istoj .. 6073
Edukaj Aŭtoritatuloj	..	982	Religiistoj .. 1244
Elektristoj	..	2272	Sciencistoj .. 987
Farmacistoj	..	1027	Sindikataĉefoj .. 381
Farmistoj	..	8657	Soldatoj .. 2895
Hotelistoj	..	1376	Studentoj .. 25064
Inĝenieroj	..	10605	Soforoj .. 1989
Instruistoj	..	15578	Ŝtatoficistoj .. 6539
Juristoj	..	1265	Teksistoj .. 1212
Ĵurnalistoj	..	943	Transportistoj .. 12560
Komercistoj	..	46370	Urboficistoj .. 3107
Konstruistoj	..	5125	Vendistoj .. 8025
Kuracistoj	..	3617	Vestistoj .. 4948
Laboristoj	..	17759	Diversaj .. 15207
Lingvistoj	..	246	
Metiistoj Diversaj	..	19533	sumo .. 272961

Esperanto ĉe Slovaka Fakrevuo

La oficiala organo de Klubo de Slovakaj Turistoj, *Klasy Slovenska (Belaĵoj de Slovakujo)* de la Marta numero uzas ĉe la ilustraĵoj Esperantan, Francan kaj Anglan lingvojn krom la Slovaka.

La eldonantoj volonte interŝanĝos kun eldonantoj de aliaj Esperanto-periodaĵoj. Skribu al la revuo ĉe Turčiansky Sv. Martin, Kuzmány-ŝtrato 29, Slovakujo, Ĉeĥoslovakujo.

J.V.D.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO kaj UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 195

5an de Julio 1947

NOVAJ DELEGITOJ

Bulgarujo

Sofia. FD (Junularo) : A. Petrunov, Str. C. Boris 60.

Ĉeĥoslovakujo

Břeclav. D : R. Trojna, Nám. Bezručů 20.

Ĉilio

San Fernando. D : J. E. Jiron Urbina, Carampangue 725.

Francujo

Arras. VD : H. Philippe, 8 Rue Pasteur. Tel : 476.

Clermont-Ferrand. FD (Komerco) : Fotografado) : R. Ponty, 43 Rue Georges-Clemenceau.

Le Mans. D : S-ino A. Boulay, 48 Rue du Chêne Vert.

Germanujo

Hamburg. FD (Polico) : Esp.-instruado) : A. Weide, Viktoriast. 41, Polizeischule. Tel : 421102.

Hispanujo

Barcelona. VD : F. Montserrat Boronat, Provenza 75, 2, 3.

Valencia. FD (Filatelo) : F. Roglá, Salamanca 18.

Villafranca del Penadés. FD (Impostoj) : E. Bruquetas Manteca, Palma 31.

FD (Vinkomerco) : E. Guilamany, Rambla San Francisco 18-I.

Hungarujo

Budapest. FD (Elektrajoj) : L. Schenk, VIII, Thék Endre-u. 6-8. Tel : 137-199.

FD (Kemio) : T. Sándor, V, Vörösmarty-tér. 4. Tel : 181-381.

FD (Komerco-kemiaĵoj) : J. Flank, V, Koháry-u. 14. FD (Komerco-tapiŝoj) : S-ino I. Flank, VI, Teréz-körut 50.

FD (Kosmetiko) : F-ino I. Rosner, V, Sallai Imre u. 8. Tel : 125-064.

FD (Kuracistaj iloj) : I. Kemény, VI, Teréz-krt. 50.

FD (Muziko) : J. Biró, V, Sallai Imre-u. 27/B.

VD (Tajloraferejoj-virina) : F-ino M. Förstner, V, Vörösmarty tér 4. Tel : 181-381.

VD (Transporto) : G. Latkovics, XV, Endre-u. 7/b, III, 1.

Kapoŝvár. D : S-ino S. Hayden Nagy, Cukorgyár.

Miskolc. VD : J. Blach, Attila-u. 16.

FD (P.T.T.) : F-ino M. Váry, Debrecenyi-u. 2/a fdsz. 1. Tel : 11-17.

Szeged. VD : D-ro G. Lukács, Mérey utca 7. Tel : 330. FD (Esp. propagando) : M. Molnár, Somogyi u. 15.

FD (Fervojoj) : P. Váradi, Lengyel-utca 13.

FD (Junularo) : J. Szeredai, Czerzi Mihály u. 3. Tel : 165.

FD (Universitataj aferoj) : D-ro I. Kopasz, Partizán u. 16-II.

Tolna. D : F. Englemann, Garay János-u. 49.

Italujo

Milano. FD (Filatelo) : G. Fevola, Viale Vittorio Veneto 6.

FD (Instruado) : C. Luccarelli, Via Zamenhof 36. Tel : 32-754.

Pisa. FD (Filatelo) : R. Lenzi, Via della Faggiola 5.

Trieste. FD (Havenaj kaj doganaj aferoj) : M. Brussi, Via Aleardi 5.

Kubo

Habana. FD (Juro) : Katolikismo) : Pastro A. López-Cabrejo Gonzalez, Calle 27 N-ro 966 entre 6 y 8, Vedado.

Madejro

Funchal. FD (Instruado) : Virinaj aferoj) : S-ino U. Sousa Pereira de Gouveia, Rua dos Ferreiros 80. Tel : 695.

Nederlando

Apeldoorn. D : J. U. Hommes, Koning Lodewijklaan 8. FD (Kristanismo Evangelia) : La D.

Arnhem. VD : H. Arends, Gravenstraat 16.

FD (Instruado) : S-ino A. M. van der Wal-Brethouwer, Amsterdamscheweg 78.

Leiden. FD (Ĉe-metoda instruado) : Dick Ponti, Rijnsburgerweg 140.

Rotterdam. FD (Gimnastiko) : J. Kuijpers, Dunantstraat 23 b.

Nov-Zelando

Otonga. D : F. A. Tocker, Otonga School, R. D. Hikurangi.

FD (Botaniko) : La D.

Polujo

Jelenia Góra. D : J. Garbar, Skr. poczt. 141.

Rodezio

Mutanda. FD (Lingvoj) : Religio ; Instruado) : J. L. Wright, Mutanda River School, P.O. Solwezi, N. Rodezio.

Svedujo

Uppsala. FD (Kristanismo ; Abelkulturo) : C. G. Bergmark, Bredmangatan 9 C. Tel : 38756.

Usono

Baltimore (Mld.). D : F. L. Broening, 107 E. Montgomery St., Baltimore 30. Tel : SA 7104.

Denver (Co.). D : W. A. Buchheim, 2380 South University Boulevard, Denver 10. Tel : SP 8670.

Pullman (Wash.). D : D. Bushaw, 1802 C Street.

St. Helena (Calif.). D : M. E. Davis, P.O. Box 99, Sanatarium, Calif. Tel : St. Helena 191-Eten. 39.

ŜANĜOJ

Danujo

Aalborg. VD : nova adreso : Vestre Allee 101.

Egiptujo

Fayum. VD : vakas.

Francujo

St. Etienne. VD : nova adreso : 44 rue Benoît-Malon.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1947

264. S-ro H. Halldor, Stockholm, Svedujo.

265. S-ino E. Czelicka, Warszawa, Polujo.

266. S-ro J. R. Pfanner, Gandorhun, Sieraleono.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 31a de Majo 1947, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Majo 1946 :

	1946	1947
Asociaj membroj ..	4798	6374
Individuaj membroj :		
MJ	838	884
MA	3519	4515
MS	236	266
Patronoj ..	23	22
DM	95	110
HM	20	20
	4731	5817
	9529	12191

DONACOJ—F. Rivelles 9ŝ., F. Sauer 5ŝ., F. Helfers 5ŝ.

DONACOJ por helpi al la kosto de la Petskribo—Fino E. E. Duthie 3ŝ. 6p., B. McGrath 7ŝ., BM/BYTM 10ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

UEA-Oficejo, Ĝenevo—La Serva Centro de UEA en Palais Wilson ne povas esti vizitata dum monatoj Julio–Septembro, pro foresto de la Administranto. Kongresanoj kiuj partoprenos la ekskurson al Ĝenevo volu memori tion.

CECIL C. GOLDSMITH,
Sekretario.

KIE ESTAS KIU?

Sepa listo

S-ro Léon Agourtine, Parizo, nun : G.F.C.C. Division Travail, Berlin, S.P. 50–359–B.P.M. 600, Via France.

S-ro Pr. Enskaitis, litova samideano, dislokita persono, D.P., 33/135, B. Camp, Assembly Centre, 800 Control Unit, B.A.O.R., Meerbeck, Germanujo, via Grand-Britujo.

S-ro Jaume Grau-Casas, la kataluna poeto esperantista revenis al sia hejmlando post dekjara ekzilo. Adreso : Casanova 155, Barcelona, Hispanujo.

S-ro Theo Krik, PoW No. A 846 778, 273 G.P.W.W. Camp, Debach Airfield, Woodbridge, Suffolk, Britujo.

S-ro Peter Nicolai, filo de J. E. Nicolai, estinta VD de UEA en Dresden : Prisonnier de guerre Nr. 231988, Dépôt 212, Saint-Avoid, Kdo 205, Petite Rosselle, Camp 3, Chambre Stube 11, Francujo.

S-ro Reinhold Raabe, estinta Delegito de UEA en Freiburg, Silezio, kun edzino, naskita Klink, esperantistino el Breslau, nun : Weddestrasse, Plattenhaus 12, (24) Hamburg 34, Brit. Zone, Germanujo.

S-ro Rudolf Strauss, estinta Delegito de UEA, nun : (19) Halle a.d. Saale, Germanujo, Sachsen, Goethestrasse 9, Russ. Zone.

S-ro Georg Sachs, el Breslau, persekutita de la Nazi-ul-oj saviĝis perdinte ĉiun havaĵon. Nuna adreso (15) Arnstadt in Thüringen, Lohmühlenweg 17, Sowjet Zone.

S-ro Rudolf Weiss, estinta D. de UEA en Duchcov, (germane Dux) en Ĉeĥoslovakujo, forpelito, nun : (19) Schönewalde, Markt 6, über Herzberg Kreis Schweinitz, Prov. Sachsen (Sovjeta Zono).

Hungarujo

La Hungara Urbeto Pestszentlörinc, apud Budapeŝt, la 25-an de Aprilo en komunuma kunsido, decidis nomi unu straton *Esperanto*.

P.B.

NIAJ MORTINTOJ

Kamarado Lanti, patro de S.A.T., mortis kiel sciigis la S.A.T.-organoj, en urbo Mexico, Februaro 1947. Inter la figuroj de la epoko post la unua mondmilito, certe Lanti estas unu el la plej rimarkindaj. Simpla metiisto, per propra forto li akiris al si altan gradon de klereco kaj ankaŭ de klereco pri ĉio homa. Lian civilan nomon *Adam* li ŝanĝis en *L'anti* (t.e. *la kontraŭa*), kaj tia li estis, kontraŭ dogmo, kontraŭ tradicio kontraŭ ĉia formo de aŭtoritateco. Oni povus doni al li tri literojn kiuj resumas lian karakteron : K.K.K.—klera, klaskonscia, kontraŭa. Komence de lia Esperantisteco li estis ano de U.E.A., sed ne trovinte taŭgan terenon por siaj ideoj politiko-ekonomiaj, li fondis S.A.T. Danke al lia dinamismo kaj al lia kapablo altiri homojn pretaj labori kaj ne babili, S.A.T. evoluis je certa grado de graveco. La Hitler-a diktatoreco ankaŭ endanĝerigis tiun ĉi organizaĵon sed ĉar ĝi respondas al bezono, ĝi restariĝis. Dume Lanti vagis tra la mondo studante kaj verkante. Malsano nekuraĝebla, sekve de insekta infekcio, decidigis lin meti finon je sia vivo.

Varia kaj riĉa estas la verkaro de Lanti. Apud tradukoj, aro da broŝuroj pri la sennaciismo (*For la Neŭtralismon*) kaj sennombraj artikoloj en la S.A.T.-gazetoj atestas pri la riĉeco de ideoj kaj lingva majstreco. En lasta tempo lin okupis multe la demando pri pli firma kontakto de la esperantaj organizaĵoj U.E.A., I.E.L. kaj S.A.T. kaj li serĉis platformon de komuna agado. Trafe skizis lin Kalocsay en la *Rimporretoj* :

Lanti—kun barbo klaskonscia
Piede premas neŭtralismon,
Rigardas tra S.A.T.-anan prismon
Kaj estas nepre sennacia.

H.J.

S-ro Ernest H. Lawton, 9a de Marto 1947. 78-jara, malnova kaj entuziasma samideano.

Pastro L. A. Long, 22an de Majo pro pulma malsano, en Foxley (Anglujo), 61-jara. Esperantisto dum pli ol 40 jaroj.

S-ino Carola Mayrleb, Februaro 1947, 76-jara, en Vieno. Aganta Esperantistino de 1909, prezidanto de la Virina sekcio en la Unua Esperantista Unuiĝo.

S-ro Gabriel Saurin, 1.5.1947, sekve de operacio. Esperantisto de 1933, kasisto de Esp.-grupo de Marseille (Francujo), 72-jara. Ĉe la enterigo H. Bourdelon, grupprezidanto, diris kelkajn vortojn en Esperanto. Fervora samideano.

S-ro Marcel Somerling, Esperantisto de 1916, fidela ano kaj kursgvidanto de la grupo en Nieuwport, Belgujo, 12an de Majo 1947, post mallonga malsano.

Mi deziras interŝanĝi ilustritajn gazetojn kaj literaturajn ojn kun ĉiuj landoj. Sendu al S-ro William Still, 11 Colville Road, London, W.3, Anglujo.

Komercedekoraciisto (montrofenestra reklamo) en unu el la plej gravaj grandmagazenoj en Svedlando dez. kor. kun samfakuloj en la tuta mondo. Li ankaŭ serĉas kontakton kun kooperanoj kaj vizitos la 32-an en Bern. Respondu al Helmer Almén, Sareksvågen 5 II, Traneberg, Svedlando.

Mi deziras interŝanĝi uzitajn pm. kaj p.i. kun la kolegoj el tuta mondo. Antonin Lebeda, instruisto, Wolkerova 9, Litomerice, Ĉeĥoslovakujo.

22-jara kantisto, profunda baso, membro de "Granda opero 5 majo" en Praha, volonte korespondos kun kantistoj el aliaj landoj, precipe Italujo. Respondo garantiata. Jiří Pytloun, Praha XII, Hooverova Opera, Ĉeĥoslovakujo.

Bonvolu saluti nin okaze de propaganda vespero je fino de Aŭgusto. Bildkartojn kaj propagandilojn ĉiuj specajn sendu amase. Ĉiu sendinto ricevos raporton pri la kunveno. Esperanto-Grupo "Ĉiam Antaŭen", 288 Welford Road, Leicester, Anglujo.

Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj deziras interrilati kun Modernistoj, Unitarianoj, kaj Liberalaj Kristanoj. Informo havebla ĉe S-ro W. E. Reeve, 32 Hillcourt Road, London, S.E.22, Anglujo.

Sveda teksistino (arta manproduktado) deziras kontakti metiistojn kaj teksartistojn por interŝanĝi ideojn, modelojn, k.t.p. F-ino Valborg Caesar, Risängen, Vamb, Skövde, Svedujo.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Tutmonde deziras interŝanĝi belajn ilustritajn poŝtkartojn, gazetojn, diversajn interesajn bagatelaĵojn, respondos certe ĉiam, Frant. Svoboda, asekurejestro, Litomyšl, Ĉeĥoslovakujo.

LA VANA KANTO

Lucien Thèvenin

Versoj dediĉitaj al la internacia amikeco

64 paĝoj, broŝ., 2 ŝil. (8 rpk.)

Mendu ĉe I.E.L.

DENOVE HAVEBLAJ

sed atentu la novajn prezojn

FUNDAMENTA KRESTOMATIO de la lingvo

Esperanto. D-ro L. L. Zamenhof.

472 paĝoj, broŝ. 6ŝ. 9p., afranko 6p. (29 rpk.)

LINGVAJ RESPONDOJ. D-ro L. L. Zamenhof.

116 paĝoj, broŝ. 2ŝ. 6p., afranko 3p. (11 rpk.)

HAMLETO. Wm. Shakespeare (L. L. Zamenhof).

176 paĝoj, broŝ. 2ŝ., afranko 3p. (9 rpk.)



Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

VIVO DE ZOLA

Aŭgusteno de Silva

Tradukita de M. de Freitas

106 paĝoj, broŝ. 3ŝ., afranko 3p. (13 rpk.)

"Oni povas senti dankon al la tradukinto, ke li prezentis al la internacia legantaro tiel bonan biografion, ne nur por refreŝigi la memoron pri Zola, sed ankaŭ por atentigi al ni la makulojn en nia homa socio, kiuj ankoraŭ—bedaŭrinde—estas tre aktualaj." M.S. en *Esperanto Internacia*.



Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

"... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn kaj por forigi la miskomprenojn."—*Heroldo de Esperanto*.

"... Pri unu afero mi estas tre kontenta ; la lingvo estas modela."

"... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga, kiun mi ĝis nun legis en Esperanto ... la frazoj portas la stampon pri instruiteco kaj ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la bezonatan nuancon ... La rezulto estas libro pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla ..."—*Esperanto Internacia*.

531 paĝoj, 19×14 cm., broŝ. 10ŝ. 6p.,
tole bind. 12ŝ. 9p., duonlede bind. 25ŝ. 6p.,
afranko 9p.

Mendu ĉe I.E.L.

EL AŬSTRUJO

Senhalte al la celo !

Facila legolibreto

ALOIS NORBERT

Prezo 1ŝ. 6p., afr. 1p. (6 rpk.)

La Mondopaco kiel psikologia problemo

HANS THIRRING

Trad. HUGO SIRK

Prezo 1ŝ., afr. 1p. (4 rpk.)

Mendu ĉe I.E.L.

NOVAJ LIBROJ EL SVEDUJO

VIVO VOKAS

Originale verkita de
STELLAN ENGHOLM

Bind., 180 paĝoj, 9 ŝil., afranko 6p.

KVARA RAPSODIO

Redaktis **FERENC SZILAGYI**

Enhavanta artikolojn kaj poemojn de multaj
bone konataj aŭtoroj

Broŝ., 48 paĝoj, 3 ŝil., afranko 2p.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo